

# *La Bulteneto*

Numero 12 • René de Saussure - Jaro 2018

Kun eseo pri Peter Altenberg - Mit einem Essay über Peter Altenberg

ISBN 978 3 903247 01 7



## **LA VIENA AKVARELO**



### **Ekspozicio en Albertina**

16a de februaro ĝis 13a de majo 2018



## La muzeo Albertina en Vieno malantaŭ la Palmejo kaj la Burga Ĝardeno.

Fotoj sur la paĝoj 1, 2 kaj 4 Walter Klag.

Intense brilantaj koloroj, vivplenaj efektoj kiel en momentaj fotoj, lumplenaj vidoj kaj atmosferaj impresoj estas la apartaj kvalitoj de la „Viena Akvarelo” en la 19a jarcento, en la tiel nomita „Bidermajra” (Biedermeier) Epoko (1815 - 1848), kiam la „Viena Akvarelo” kulminis. Ravaj urbaj panoramoj aŭ naturaj pejzaĝoj, detalaj portretoj, floroj, ĝenrobildoj de ĉiutagaj vivscenoj, burgoj aŭ kasteloj kaj interioroj de princaj palacoj estas la riĉa aro da motivoj en tiu floranta epoko de la aŭstria arto. Jakob Alt, Matthäus Loder, Thomas Ender, Peter Fendi kaj Moritz Michael Daffinger estas la plej eminentaj artistoj en tiu periodo. Vere elstaraj estas la artverkoj de Rudolf von Alt (filo de Jakob Alt), kiu estis kreive forta eĉ dum sepdek jaroj. Rudolf von Alt, kiu majstre regis la akvarelan arton, estis unu el la plej popularaj artistoj de la 19a jarcento en Vieno.

Albertina posedas ĉirkaŭ 2500 akvarelojn de aŭstraj pentristoj el la 19a jarcento. La aktuala ekspozicio en Albertina, vizitebla ĝis la 13a de majo 2018, montras pli ol 200 eksterordinare belegajn artverkojn el la muzea arĥivo mem. Aldoniĝas gravaj pruntaĵoj el privataj kolektoj.

Jam en Malnova Egiptio (tria jarmilo antaŭ Kristo) oni pentris akvarelojn sur papirusoj. En la mezepoka periodo oni miksis akvarelan farbon kun blanka farbo kaj ricevis netravideblan surfacon. Tiam oni ilustris librojn per lignogravuraĵoj kaj kolorigis ilin per akvarel-farboj. Pentristoj kiel Albrecht Dürer (1471 – 1528) kaj Rembrandt (1606 – 1669) uzis akvarelojn por prepari ole-pentraĵojn.



D-ino Maria Luise Sternath, la kuratorino de la ekspozicio kaj prof. d-ro Klaus Albrecht Schröder, ĝenerala direktoro de Albertina, dum gazetara konferenco la 15an de februaro 2018.

Dürer pentris per akvosolveblaj farboj sur pergameno kaj papero; li pentris plurajn travideblajn farbtavolojn unu sur alian. Novaĵo estis, kiel li kreadis la partojn blankajn en akvarelpentraĵo; tute ne temas pri farbo, temas pri partoj sen iu ajn farbo: Por atingi efektojn de lumoj sur la pentraĵo li lasis la paperon blanka.

Fine de la 15a jarcento akvareloj ne gravis kiel memstaraj artaĵoj, sed kiel preparigaj laborfazoj por ole-pentraĵoj. Unue en la 18a jarcento, la tempo de florado de la akvarelpentrado, la anglaj pentristoj William Turner (1775 - 1851) kaj Thomas Girtin (1775 - 1802) sukcesis evoluigi la teknikon kaj samtempe starigi la akvarelon kiel propran artformon. Ili estis du el la plej grandaj majstroj de la akvarelo en la 18a jarcento. Turner pentris sur malsekan paperon per malsekaj farboj, forskrapis farbojn, uzis spongojn kaj elgratis farbojn. Aliaj renomaj akvarelpentristoj estis John Constable (1776-1837) kaj John Sell Cotman (1782-1842).

En la jaro 1804 fondiĝis „Society of Painters in Water Colours” (ekde 1988 „Royal Watercolour Society”), kiu organizis sian unuan ekspozicion jam en la jaro 1805. La granda sukceso kuraĝigis la societeton al ĉiujaraj ekspozicioj. En la 19a jarcento „Water Colour Societies” estis inĝeniaj entreprenoj subtenante la uzadon de tiu pentrada tekniko! La posta evoluo sekvis ne la poezi-eman Turner, sed la pli realisman Girtin.



Jakob Alt: Rigardo el la ateliero de la pentristo en Alservorstadt (9a distrikto de Vieno) al Dornbach (17a distrikto), 1836. Albertina.

En la 19a jarcento populariĝis la akvarela pentrado eksterdome surloke, ne nur en ateliero. Fame konataj pentristoj en Anglio kaj Francio, kiuj multe uzis akvarelfarbojn, estis Samuel Palmer (1805-1881), Alfred William Hunt (1830 - 1896), Camille Pissaro (1830 - 1903), Paul Gauguin (1884 - 1903), Paul Cezanne (1839 - 1906); dum kreado de siaj pli ol 400 akvareloj Cezanne intensive eksperimentadis per tiu akvareltekniko.

En Aŭstrio estiĝis pejzaĝaj bildoj, kiuj montras alpajn glaĉerojn. Oni povas imagi, kiel malfacila tia speco de pentrado estis je temperaturoj ĉirkaŭ nul gradoj, kiam akvosolveblaj farboj povas glaciĝi. Alimaniere oni nur skizis la koncernan bildmotivon en la naturo kaj daŭrigis en ateliero. La ĉefduko Johano de Stirio (Erzherzog Johann) laborigis kelkajn pentristojn, kiuj bildigis pejzaĝojn kun industriaj objektoj, tiel montrante la komencantan industriigon de Aŭstrio. Fruktdona tradicio estiĝis en Vieno, kie Rudolf Ritter von Alt (1812 - 1905) pentris pli ol 1000 akvarelojn de tiamaj aŭstriaj pejzaĝoj kaj arkitekturo. La akvareloj de Alt elstaras pro siaj topografia ekzakteco kaj spirita atmosfero de la loko. Eĉ 100-foje li bildigis la Katedralon de Sankta Stefano en Vieno.



Rudolf von Alt: Monto Dachstein en Salzkammergut,  
vidata de Vorderer Gosausee, 1838.  
Akvarelo, Albertina, Vieno.



Ekde la komenco de la 20a jarcento la akvarelarto liberigis sin de la tradiciaj konvencioj. La ekspresionistoj Emil Nolde (1867 - 1956), Christian Rohlf (1849 - 1938), Karl Schmidt-Rottluff (1884 - 1976) kaj August Macke (1887 - 1914) evoluigis novan akvarelan stilon. Aliaj influhavaj akvarelistoj estis Paul Klee (1879 - 1940) kaj la rusland-divena Wassily Kandinsky (1866-1944). Kandinsky kreis la unuajn akvarelojn abstraktajn, kiuj ne plu bildigis iu ajn konkretan objekton.

Emil Nolde estas rigardata kiel la plej impresa kaj plej konata akvarelisto de la 20a jarcento, same novige kiel Turner siatempe; li evoluigis la teknikon de la akvarelpentrado ĝis limoj de teknikaj eblecoj, similmaniere nur William Turner sukcese eksperimentis.

Renate kaj Walter Klag



### Fontoj

Schröder, Sternath: Von der Schönheit der Natur. Albertina: 2015.

[www.kunst-und-farbe.de/aquarellmalerei/geschichte-der-aquarellmalerei](http://www.kunst-und-farbe.de/aquarellmalerei/geschichte-der-aquarellmalerei)

[www.deutsche-aquarell-gesellschaft.de/emil-nolde-kultur-online.net/?q=node/15244](http://www.deutsche-aquarell-gesellschaft.de/emil-nolde-kultur-online.net/?q=node/15244)

[de.wikipedia.org](http://de.wikipedia.org)

[www.albertina.at/presse](http://www.albertina.at/presse)





Wilhelm August Rieder:  
La komponisto Franz Schubert, 1825. Wien-Museum.

# Peter ALTENBERG

## Ĉarma Strangulo

### El la vivo de Peter Altenberg

Walter Klag patro kaj filo

Altenberg naskiĝis en la jaro 1859 kiel Richard Engländer en la dua distrikto de Vieno. Li estis filo de riĉa, asimilita juda komercisto. Kiel kutime en bonstata familio li ne vizitadis elementan lernejon, sed edukiĝis de privata instruisto. Poste li frekventis la Akademian Gimnazion, kie li ne sukcesis fari la abituron. Unu jaron poste li tamen abituris en alia elita gimnazio: Theresianum.

Kiel studento de medicino, botaniko kaj juro li restis sensukcesa. Same li nur mallonge lernis librokomercon. Altenberg estis laŭ konstato de kuracisto nekapabla ion lerni, ĉar lia nerva sistemo estis tro incitiĝema.

Lia pseŭdonimo venas de la vilaĝo Altenberg ĉe Danubo norde de Vieno kaj de knabino! En Altenberg li pasigis ioman tempon ĉe samklasano, kiu havis du fratojn kaj kvar fratinojn, ĉiuj pli junaj ol la knaboj. La fratoj devigis la fratinojn servi: Surtablighi manĝaĵojn, demeti la ŝuojn de la knaboj kaj tiel plu, tute konforme al la tiama rolo de la inoj, kiun Altenberg ofte akre kritikadis. La fratoj eĉ uzis virajn moknomojn por la fratinoj: *Peter* por la plej juna knabino *Bertha*, ĉar la servo fare de inoj estintus sub la digno de la junaj sinjoroj.

La unuan fojon Altenberg uzis sian pseŭdonimon nur en 1896, kiam aperis lia unua libro »Kiel mi ĝin vidas«. Tiam li estis jam 37jara. 1910 li iĝis kristano.



La knabino  
Bertha „Peter“ Lecher.

Sen regulaj enspezoj li pasigis la tempon en vienaj kafejoj, teatroj kaj kabaredoj. Oni diris: Se Altenberg ne estas en kafejo, li estas survoje tien. Lia poŝta adreso estis Kafejo Central. Tie nun memorigas pupo el papermaĉaĵo pri li.

Post kiam lia patro bankrotis, Altenberg vivis de plimalpli regula pensio, kiun kolektis liaj mecenatoj. Tiam estis bona kutimo lin finance subteni.

Tamen li estis konata kiel petemulo. Iuvespere li diris al sia amiko Karl Kraus:

»Karl, donu al mi dek kronojn, donu al mi dek kronojn!«

Kraus: »Vidu, Peter, mi volonte donus al vi, sed mi vere ne havas!«

Altenberg, malavare: »Mi pruntas al vi!«

Altenberg estis petema kaj ŝparema, sed ne avara. Kiam li mortis en 1919 li heredigis grandan sumon - 107 834 kronojn - al viena porinfana asocio. Krome li posedis 10 000 bildkartojn, kiujn nun havas la Historia Muzeo de Vieno.

## Prononcoj kaj klarigoj

Richard Engländer [riĥard énglenda].

Theresianum [terezianum].

Bertha Lecher [berta leĥa].

Kafejo Central aŭ Café Central troviĝas apud la haltejo Herrengasse de la Viena metrolinio U3.

Krono: Tiama aŭstria monunuo. La ekvivalento de unu krono en la jaro 1910 estas hodiaŭ ĉirkaŭ 10 €.

Vöslau [fesláŭ], kuracbanejo sude de Vieno.

Usona Koktelejo, American Bar aŭ Loos-Bar; ĝi troviĝas en la unua distrikto de Vieno, en Kärntner Durchgang.





Altenberg-Pupo en Kafejo Central, Vieno, unua distrikto.



Poŝtmarko, Koloman Moser, 1908.  
Sur la bildo imperiestro Francisko-Jozefo la unua.

# Tekstoj de Peter Altenberg

## Erinnerungen

Ich soll für ein großes Blatt meine »Memoiren« schreiben. Ja, sind denn nicht alle diese tausend Impressionen in meinen neun Büchern bereits meine »Memoiren?«

Ach, Sie meinen zum Beispiel so:

Es waren einmal zwei gutsituierte hübsche Brüder, die einen Engros-Handel mit kroatischer Bauernware hatten. Es war im Jahre 1857. Da begab es sich, daß die beiden eleganten Brüder in Wien auf einem »Eliteball« waren, wo zwei Schwestern ob ihrer Schönheit dem Erzherzog Karl Ludwig vorgestellt wurden. Um die Jüngere hielt nun der jüngere Bruder am nächsten Vormittag an. »Ja, mein lieber Herr, das wäre ja ganz prächtig, denn Sie sind wohlsituiert und unsere Töchter besitzen nur ihre Schönheit. Aber vor Hermine muß Pauline, die ältere, Achtzehnjährige, verlobt sein!« Da ging der jüngere Bruder denn hin zu dem älteren Bruder und erzählte ihm diese Angelegenheit. Da sagte der ältere Bruder: »Ich darf deinem Glück nicht im Weg stehen, Pauline ist ebenso schön wie deine Hermine, ich werde heute noch mich mit ihr verloben!« Dieser ritterlichen Bruderliebe verdanke ich meine Anwesenheit auf Erden! Meine Mama hieß Pauline.

## Memoroj

Oni postulas, ke por granda gazeto mi skribu miajn rememorojn. Ĉu oni ilin ne jam legis en miaj naŭ libroj?

Eble vi volas ekzemple tion legi:

Iam vivis du bonstataj beletaj fratoj, kiuj havis pograndan komercon per kroataj kamparanaj varoj. En la jaro 1857 okazis, ke la du elegantaj

fratoj en Vieno vizitis elitan balon, kie du fratinoj estis prezentitaj al la arkiduko Karlo Ludoviko, ĉar ili estis tre belaj. De la pli juna fratino nun petis la manon la pli juna frato je la sekva antaŭtagmezo. »Jes, mia kara sinjoro, tio ja estus bonege, ĉar vi bonstatas, kaj niaj filinoj nenion posedas krom beleco. Sed antaŭ Hermine devas esti fianĉinigitaj Paŭline, la pli maljuna, la dekokjaraĝa!« Iris la pli juna frato do al la pli maljuna frato kaj rakontis al li tiun aferon. »Mi ne povas bari vian feliĉon, Paŭline estas same bela kiel via Hermine, mi ankoraŭ hodiaŭ fianĉiĝos kun ŝi!« Al tiu kavalira fratoamo mi dankas mian ekzistadon sur la tero! Mia panjo nomiĝis Paŭline.

## Vöslau

Vöslau, eigentümlicher Ort, einzige wirkliche Sentimentalität, die ich habe. Deine grünbefranste Station ist geblieben wie eh und je. Nur meine wunderschöne Mama, die mich im Damenbade sorgsam auf ihren Armen wiegte, ist längst nicht mehr. Die Lindenblüten rochen wunderbar, und das sonnengedörrte Holz der Kabinen und die Wäsche der triefenden Schwimmanzüge. Der Kies brannte die zarten Kinder- und Frauensohlen. Vom Wald kam Tannenharzduft, und von den Hausgärten kamen Millefleursgerüche. Meine Mama hielt mich zärtlichst mitten im Teiche, der für mich ein Ozean war! Sie verschwendete ihre romantische Zärtlichkeit an ein egoistisches, verständnisloses Kindchen, das ihren Hals in Angst umklammerte. Wunderbar ist der eingedämmte Bach, von der Station aus bis zum Bade. Links ungeheure üppige Wiesen, die zu nichts zu dienen scheinen und herrliches, dichtes Unkraut produzieren, für nichts und wieder nichts. Der Wind rauscht eigentümlich in den Tannen. Man hält es für einen mysteriösen Aufenthalt für Rekonvaleszenten, für kleine zarte Mädeln. Es ist so ein Sanatorium für müde Menschen. Die graublaue Ursprungsquelle von vierundzwanzig Grad Celsius ist wie lebenspendend. Sie spricht nicht viel, sie murmelt und gewährt! Viele



Hausgärten sind voll von Frieden und Pracht. Im Cafégarten hart beim Bade ist es kühl vor Baumschatten wie in einem Keller. Daneben ein unbekannter Park wie ein Urwald. Niemand hat ihn vielleicht je betreten, ihn gestört in seinen überschüssigen Kräftespendungen! Wozu braucht man Brasilien und Lianenverstrickungen und Blütendunst und Geranke?!? Dieser Park ist Urwald. Vöslau, immer noch, seit fünfundvierzig Jahren, ist deine Station grünbefranst, und in dem Bache plätschern lustig die Enten, die unmittelbar darauf abgestochen werden, denn der murmelnde Bach ist nur ein letztes Reinigungsbad, gleichsam eine Vorleichenwaschung. Beim Bade duftet es nach Lindenblüten. Nichts hat sich verändert. Nur meine Mama ist nicht mehr.

## Vöslau

Vöslau, stranga loko, sola vera sentimentaleco, kiun mi havas. Via verdefranĝita fervoj-stacio restis kiel iam kaj tiam. Nur mia mirinde bela panjo, kiu en la porsinjorina banejo zorgeme lulis min en siaj brakoj, jam longe ne plu vivas. La tiliofloroj mirakle odoris, same kiel la sunsekigita ligno de la kabanetoj kaj la tolaĵo de la gutantaj naĝkostumoj. La gruzo bruligis la delikatajn infanajn kaj sinjorinajn plandojn. De la arbaro venis abia rezinodoro, kaj el la vilaĝaj ĝardenoj odoroj de mil floroj. Mia panjo karese min tenis meze en la laĝeto, kiu por mi estis oceano. Ŝi malŝparis sian romantikan karesemon al egoisma, senkomprenema infaneto, kiu timante ĉirkaŭplektis ŝian kolon. Belegas la rivereto, kiu fluas de la stacio ĝis la banejo inter digoj. Maldekstre grandegaj abundaj herbejoj, kiuj ŝajnas utili al nenio, kaj produktas belegan densan fiherbaron, por nenio, por nenio. La vento strange susuras en la abioj. Oni kredas la lokon mistera restadejo por resaniĝantoj, por malgrandaj, gracilaj knabinetoj. Tiel ĝi estas sanatorio por lacaj homoj. La dudekkvar gradojn varma akvo el la grizblua fonto estas kvazaŭ vivodona. Ĝi ne parolas multon, ĝi murmuras kaj plenumas! Multaj domĝardenoj estas plenaj je paco kaj

pompo. En la kafeja ĝardeno tuj ĉe la banejo estas malvarmete kiel en kelo pro la arba ombro. Apude nekonata parko, kvazaŭ praarbaro. Eble neniu ĝin iam eniris kaj maltrankviligis ĝiajn troajn fortodonacojn. Por kio oni bezonas Brazilon kaj kunplektitajn lianojn kaj florhaladzon kaj grimptigaron?!? Tiu parko estas praarbaro. Vöslau: Ĉiam ankoraŭ, ekde kvardekkvin jaroj, via stacio estas verdefranĝita, kaj en la rivereto gaje plaŭdas la anasoj, kiuj tuj poste estos buĉataj, ĉar la rivereto funkcias nur kiel lasta puriga bano, kvazaŭ antaŭfunebra lavado. Ĉe la banejo odoras tiliofloroj. Nenio ŝanĝiĝis. Nur mia panjo ne plu vivas.

## Der Brand

Um zwei Uhr morgens kam die Nachricht in die American Bar, daß ein Palais nächst dem Stadtpark in Flammen stehe. Wir ließen unsre wunderbaren Mischungen sofort stehen, fuhren im Fiaker rasend hin. Auf dem Dache des fünfstöckigen Palastes leuchteten die weißen Magnesiumfackeln der Feuerwehr, und goldgelbe und rote Funken fielen zur Erde. Unten im Finstern der Straßen leuchteten die Lampen der Feuerwehr Automobile wie getreue Wächterhundeaugen! So besorgtgutmütig!

Der Stadtpark war schwarz und einsam. Auf einer Bank saßen zwei, Hand in Hand. Sie betrachteten den Brand des Palais, hörten die Feuerwehrsingale: »Wasser! Wasser! Wasser!«, und sie waren und sie blieben versunken in ihrem eigenen unentrinnbaren Schicksal, Hand in Hand.

Das Palais brannte, und man erließ für die obern Parteien bereits die Nachricht, sie möchten delegieren und herabkommen - - -.

Der Stadtpark war einsam und im Dunkeln - -.

## La incendio

Je la dua matene venis mesaĝo en la Usonan Koktelejon, ke apud la Urba Parko palaco estus en flamoj. Ni ne eltrinkis niajn mirindajn miksaĵojn kaj tuj alrapidegis per fiakro.

Sur la tegmento de la kvinetaĝa palaco lumis la magneziaj torĉoj de la fajrobrigado, kaj orflavaj kaj ruĝaj fajreroj falis teren. Sube en la malhelo de la stratoj lumis la lampoj de fajrobrigadaj veturiloj kiel la fidelaj okuloj de gardhundoj! Tiom zorgemaj-bonanimaj!

La Urba Parko estis nigra kaj soleca. Sur benko sidis du, man' en mano. Ili observis la brulon de la palaco, aŭdis la ordonojn: »Akvon! Akvon! Akvon!« Kaj ili estis kaj restis enprofundiĝintaj en ilia propra senelira sorto, man-en-mane.

La palaco brulis, venis la alvoko por la loĝantoj en la supraj etaĝoj, ke ili forlasu ĉion kaj iru eksteren - - -.

La Urba Parko estis soleca kaj malhela - -.



## Zitate Citaĵoj

Überall gibt es Zuschauer - Menschen, die an etwas interessiert sind, das sie gar nicht interessiert.

Ĉie estas spektantoj – Homoj, kiuj interesiĝas pri io, kio ne interesas ilin.

Die Mode ist ein ästhetisches Verbrechen. Sie will nicht das Endgültig-Gute, das Endgültig-Schöne. Sie will immer nur etwas Neues.

La modo estas estetika krimo. Ĝi volas ne la finfine bonan, ne la finfine belan. Ĝi nur volas ĉiam ion novan.

Gott denkt in den Genies, träumt in den Dichtern und schläft in den übrigen Menschen.

Dio pensas en la geniuloj, revas en la poetoj kaj dormas en la ceteraj homoj.



La Bulteneto. Jaro 2018. Numero 12. Aŭtoroj: Walter kaj Renate Klag.

Redaktejo: 1190 Wien, Rudolfinergasse 8/11, [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at).

*Anzeigen – Anoncoj*

**95. Deutscher Esperanto-Kongress**  
**und**  
**Französischer Esperanto-Kongress**  
**und**  
**Luxemburger Esperanto-Kongress**



**Dreiländer-Esperanto-Kongress in Zweibrücken**

**18. - 21. Mai 2018 Pfingsten**

**Thema: Esperanto - global vernetzt**

Unser Kongressgebäude ist die Hochschule, Amerikastraße 1,  
66482 Zweibrücken/Pfalz.

Einige der Programmpunkte:

Stadtführung im Stadtzentrum, Besuch von Europas Rosengarten, Besuch des romantischen Schlosses "Fasanerie", Begegnung mit Pferden auf "Anjas Ranch", Busfahrt nach Pirmasens und Umgebung, Busfahrt nach Blieskastel, Busfahrt nach Bitsch (Frankreich).  
Fachvorträge, Internationaler Abend mit Musik und Tanz, Gottesdienst.

Informationen, Kontakt und Anmeldung:

Internationaler Esperanto-Klub Zweibrücken, Postfach 2019, 66470 Zweibrücken

[95aGEK@esperanto-reto.eu](mailto:95aGEK@esperanto-reto.eu)

# Esperanto in Wien lernen

ESPERANTO

## EINE STUNDE KOMPAKT

### FÜR STUDENTINNEN UND STUDENTEN

im Café Schopenhauer, Wien 18., Staudgasse 1.

5 Gehminuten von U6 Währingerstraße.

Die Termine erfahren Sie bei

[esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

Teilnahme kostenfrei • Keine Spende



## Esperanto-Jugend-Lernrunde Wien

für Junge und Junggebliebene,

für alle Sprachniveaus.

Bei der besten, größten und billigsten Pizza Wiens lernen wir  
in gemütlicher und unterhaltsamer Runde ganz individuell.

**Pizzeria Mafiosi, Wien 15., Reindorfstraße 15**

Termine und Anmeldung: [jel\\_vieno@yahoo.com](mailto:jel_vieno@yahoo.com)

Teilnahme kostenfrei • Keine Spende



## Freie Esperanto-Lernrunde Wien

Termine: [kurt.lhotzky@gmail.com](mailto:kurt.lhotzky@gmail.com)

Literaturbuffet, Wien 2., Rotensterngasse 2.

U2 Taborstraße

Teilnahme kostenfrei • Keine Spende

“Esperanto ist eine hervorragend gelungene Form der  
Optimierung von Sprache  
für die internationale Kommunikation.“  
Univ.-Prof. Dr. Heiner Eichner, Wien

# DIE NEUE SILBERMÜNZE-MEDAILLE 100 STELOJ



## Anlass: 150. Wiederkehr des Geburtstages von René de Saussure 17. März 1868 – 2. Dezember 1943

René de Saussure war ein Schweizer Sprachwissenschaftler und der Erfinder des universellen Geldes.

Sein Bruder Ferdinand de Saussure war der Begründer der modernen Linguistik.

Streng limitierte Auflage: 1000 Stück, keine Nachprägungen. Durchmesser: 37 mm.

Oberfläche: Polierte Platte. Lieferung in einer Kunststoffkapsel der Münze Österreich.

Masse: 1 Unze Feinsilber 999/1000 (31,1 Gramm). *Zertifikat gratis.*

*Aus gesetzlichen Gründen ist die Silberpunze 925 aufgeprägt.*

Herausgeber und Entwerfer: Mag. Walter Klag.

Künstlerische Feinarbeit: Mag. Helmut Andexlinger, Chefgraveur der Münze Österreich AG.

Helmut Andexlinger leitet seit 2016 die Graveurabteilung der Münze Österreich. Er hat die Fachschule für Metalledesign in Steyr absolviert, ebenso das Studium der Kommunikationswissenschaften an der Universität Wien.

Zu seinen größten Erfolgen zählt das Design für die 2-Euro-Münze 2012, die in 17 Ländern in Umlauf ist; er gewann dafür einen Wettbewerb mit 800 Einreichungen.

Hersteller: Münze Österreich AG, Wien 3., Am Heumarkt 1; [muenzeoesterreich.at](http://muenzeoesterreich.at)

Stelomünzen werden bei internationalen Veranstaltungen verwendet. Trotzdem werden sie auch Medaillen oder Zahlmedaillen genannt.

Weitere Informationen bei [de.wikipedia.org/wiki/Stelo](http://de.wikipedia.org/wiki/Stelo) und

<https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>



La Bulteneto. Jaro 2018. Numero 12. Aŭtoroj: Renate kaj Walter Klag.

Redaktejo: Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Aŭstrio.

[esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)



# Esperanto-Kongresse für junge Leute

Internacia Junulara Kongreso IJK

Somera Esperanto-Studado SES

Junulara Esperanto-Semajno JES



Klaĉ-Kunveno Post-Somera KKPS

Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita FESTO

Bei einigen dieser Kongresse kann man mit Steloj zahlen.

1 Eŭro  $\approx$  4 Steloj    1 Stelo  $\approx$  25 €-Cent



# GEDENKJAHR 2018

2018 ist Saussure-Jahr. Vor 150 Jahren, am 17. März 1868, wurde René de Saussure in Genf geboren.

Nach dem Studium der Sprachwissenschaft und der Mathematik verfasste er sein wichtigstes Werk "Über die Wortbildung im Esperanto".

1907 publizierte René de Saussure das Projekt einer universellen Währung, die er "Spesmilo" nannte. Aus dem französischen Wort "espèce" leitete er "speso" ab. Mil bedeutet 1000. 1 Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj (Sc) = 100 Spesdekoj (Sd) = 1000 Spesoj.



S



Diese Währung wurde offiziell von einigen britischen und Schweizer Banken verwendet.

Der Spesmilo (Sm) hatte den Wert von 0,733 g reinem Gold und konnte wegen der Goldbindung leicht in andere Währungen umgerechnet werden:

1 Sm = 2 Britische Schillinge = 1 Russischer Rubel = 0,5 US-Dollars = 2,5 Schweizer oder Französische Franken = 2,5 Spanische Peseten.

Die Münzen zu 1 und 2 Sm waren und sind bis heute begehrte Sammelobjekte und verschwanden daher schnell aus der Zirkulation. Seit 1919 hat der Spesmilo nur mehr numismatischen Wert.

1942 wurde in den Niederlanden die Universala Ligo gegründet. Diese Organisation trat für die internationale Verständigung und eine universelle Währung ein. Der Name dieser Währung ist Stelo (Esperanto: Stern; Mehrzahl Steloj). 1959 wurden Münzen zu 1, 5 und 10 Steloj geprägt, 1965 folgten drei Varianten einer 25-Steloj-Münze. Auch Papiergeld wurde herausgegeben. Die Steloj eigneten sich sehr gut vor allem für die Überweisung von kleineren Beträgen im internationalen Zahlungsverkehr. Auch diese Münzen und Geldscheine wurden eifrig gesammelt und sind heute sehr gesucht.





Zur 150. Wiederkehr des Geburtstages von René de Saussure am 17. März 2018 wurde eine silberne Medaille in Form einer Münze mit einer Nominale von 100 Steloj herausgegeben. Sie besteht aus 1 Unze Feinsilber 999/1000 (31,1 g), der Durchmesser beträgt 37 mm. Hersteller ist die Münze Österreich, eine Tochter der Österreichischen Nationalbank. Die künstlerische Feinarbeit stammt von Mag. Helmut Andexlinger, der Chefgraveur der Münze Österreich ist. Andexlinger leitet seit 2016 die Graveurabteilung der Münze Österreich. Er hat die Fachschule für Metalldesign in Steyr absolviert, danach studierte er Kommunikationswissenschaften an der Universität Wien. Zu seinen größten Erfolgen zählt das Design für die 2-Euro-Münze 2012, die in 17 Ländern in Umlauf ist; er gewann dafür einen Wettbewerb mit 800 Einreichungen.



Esperanto ist im Aufschwung. In den letzten drei Jahren meldeten sich über 1,5 Millionen bei den kostenfreien Esperantokursen von lernu und duolingo an. Parallel dazu steigen auch die Teilnehmerzahlen bei Esperanto-Jugendkongressen.

Abbildungen von Stelo-Münzen findet man bei Wikimedia Commons unter <https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>

Mag. Walter Klag, Korrespondent des esperantosprachigen Magazins Monato [www.monato.net](http://www.monato.net), Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Österreich, Europäische Union.



# Internationales Esperanto-Museum

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730    💻 [esperanto@onb.ac.at](mailto:esperanto@onb.ac.at)

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage.**



Im selben Haus befinden sich auch die

**Sammlung für Plansprachen,**

die

**Musikaliensammlung**

und das

**Globenmuseum**

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono